



La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio:

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 124 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio, 10 Oktobro 1930.

VIZITO DE F-INO SINNOTTE AL JAPANUJO.

Antaŭ mia mallonga sed neniam forgesota vizito al Japanujo, mi devis diradi, ke la malmultaj japanoj kun kiuj mi interparoladis ne bone estris la anglan lingvon. Ili mikse uzadis la "l" kaj la "r", "he" kaj "she" k.t.p. Tial mi nun konfesu, ke veturonte Japanujon, mi sentis timon, ke la japanaj Esperantistoj neklare kaj nekorekte parolos ankaŭ Esperanton.

Miaparte, la karan lingvon jam de longe mi ne uzis buŝe kaj pro tio sciis, ke la longo mia, kvazaŭ rigidiĝinte, ne facile elformadas la Esp. parolerojn. Trovante min inter areto da turistoj, el kiuj mi sola estis Esperantisto, mi do severe detenis min uzi la lingvon antaŭ ili, ĉar vere mi ne volis ĝin ridindigi per hazarda renkonto kun fremdlandanoj, ĉe kiuj mi eble fuŝbalbutos en la int. lang.

Tamen mia antaŭtimo estis tute senbaza. Ĉu ne vere, ke jam en kelkaj landoj eŭropaj mi libere babiladis Esperante? Ĉu mi ne efektive forgesis, ke mi paroladas en lingvo ne l' patra? Sed tiuj verdamikoj de antaŭaj tagoj ne estis el Oriento. Kiun ĉi fakton ankoraŭ pripensante, mi malŝage fortenis min de ia feliĉa kultura kunuleco, ĝis atingis mi fervoje Kioto.

Ĉe tiurba hotelo mi demandis, ĉu eble kontaktiĝi kun ia Espisto? Samvespere mi ricevis informon, ke jam atendas min naŭ sinjoroj kaj unu sinjorino samideanaj. Emocio kaj lingva malekzerco nepovigis min alparoli ilin aŭ klare aŭ flue, sed ilia vera plezuro renkonti alilandan Esp-iston, ilia deziro senĝenigi min, ankaŭ mia elkora ĝojo ilin vidi, rapide forigis ĉian embarason. Ni pasigis feliĉan horon ĉiu dubo for, ĉar vere la frazoj facile fluadis elbuŝe kaj amiksento unueca perfekte regis inter ni. Unu estis eldonisto, unu arhitekto, unu inĝeniero, unu kuracisto,

kaj kelkaj studentoj. Antaŭ ol disiĝi, mi akceptis inviton ĉeesti bonvenvesperon ĉe restoracio. Tio ja donis al mi plezurriĉan tempon; muzikante, babilante kaj interŝanĝante radiojn de l' vera kamaradeco, ni ja sentis la forton de la Zamenhofa spirito. Donacojn ili plenmane ŝutis al mi ardore.

Malvarmumon mi suferis kaj la okuloj brulume flamis; tial unu gasto, fama okulisto, d-ro Ĉ. Nakano, esprimante netrankvilon pro tio, petis permeson ekzameni ilin jam tuj. Rezulte el tio, en la sekvanta mateno mi sidis en lia kabineto por submeti kuracon. Post nur minutoj la doloro faciligis, kaj la specialisto min informis, ke sek-vante lian instrukcion mi baldaŭ riricivos normalajn okulojn. La bonkora homo rifuzis akcepti honorarion, kaj aldonon faris al sia sindoneco, en tio, ke li gargarigis al mi la gorgon. Ĉiuvorte en Esperanto!

S-ron Ŝuzi Nakahara, eldonisto, mi renkontis la sekvantan tagon. Li aliĝis al nia kunularo iranta al la vaste konata te-rito kaj ĉerizflordanco. Babilante Esperante ni preskaŭ forgesis, ke ne-Esperantistoj ekzistas, jen voĉo angla: "Pardonu min, sinjorino; ĉu vi parolas japanen?" Ridete mi respondis: "Ne, Esperanton! Mia sinjora alparolato nur balbutetas angle, kaj mi tute ne japanen." "Kio?!" diris frapite la sinjoro. "Mi do devas pli sciigi pri ĉi tiu mirindaĵo. Mi estas eldonisto el Nov-Jorko alveninta por negoco, sed mi tute me povas progreson fari! Malfacilege al mi estas, kompreni japanbuŝan anglajn, kaj ĉilandanoj reciproke min ne komprenas. Kie mi serĉu informon pri tiu ĉi lingvo Esperanto? Mi devas ĝin lerni." Fiere mi respondis, ke la sinjoro kun kiu mi ĵus parolis ankaŭ estas eldonisto, kaj ke li volonte donus ĉian informon; eĉ pli fiere mi interpretis la aferon. La du sinjoroj inter si donis nomkartojn, poste mi sciigis, ke ili

havas komunajn konatojn en la eldon-ista mondo.

En Tokio trafis min ĉia bonesprimio. Tri sinjoroj vizitis min pro Esp. societo, inviton portante al bela konstruo Y.M.C.A. (junvira kristana asocio). Almenaŭ 60 Esp-istoj alestis, kaj ni multe interplezuris.

Iun dimanĉon dekduo da Esp-istinoj bonvenigis min ĉe apartamento de unu. Ili ĉiuj estis progresemaj pensuloj, praktikantaj ian profesion aŭ metion, kun escepto de patrino de sepjara etulino, kiu ĉi ankaŭ parolas Esperanton. "Lumi" (ŝia nomo) grandanime donacis al mi unu sian pupeton.

Ĉiuj parolis flue, korekte. Bonvolege ili plenumis ĉian deziron mian. Espriminte sopiron vidi la mondkonatan verkiston kaj soci-bonfaranton, Tojohiko Kagawa, ili tuj respondis: "Ni aranĝos intervjuon por vi; li estas nun en Tokio." Sed ho ve, mia vizitlisto estis plenplena, kaj mi ne povis ne agi laŭ antaŭaranĝo. Mi vizitis popollernejon, kaj interese observis la infanknaban klason ĉe laboro. Gepatrojn oni invitas ĉeesti la instruadon, por kunlabori kun la lernejsvidantoj. La anglan lingvon oni devige instruas altlerneje kaj universitate.

La instruiteco estas tre ĝenerala en Japanujo, tial kiom grava por nia afero estas la fakto, ke tiel kon-hava kaj lert-pensa popolo fervore uzas Esperanton.

Per Esperanto mi trakondukiĝis la du plej grandajn eldonejojn en Tokio. La Asahi estas la plej kolosa en Oriento; ĝia tagĵurnalo havas la plej altan vendciferon inter la japana gazetaro. Tie ankaŭ uziĝas eĉ la vidradio. La multetaĝa konstruo estas pli riĉe ekipita ol tiaspecaj en Usono kaj Germanujo. La redaktoro, s-ro Zenmara Toki, estas Esperantisto. Mi vizitis ankoraŭ eldonejon Kiboŝa, el kie fluadas kvin gazetoj kaj revuoj, inkluzive unu Esperanto - Japanlingva kaj unu brajla. Entute ili vendiĝas en miliono de ekzempleroj. Ĉiu oficisto devas lerni Esp-on, kaj antaŭ 200 mi alparolis nialingve en granda lekcihalo. Aliloke en la konstruo, en "laborlernejo," knabinoj lernas i.a. Esperanton, duontage okupataj per manlaboro, la ceteron de l' tago per mensa.

Mia verda steleto montriĝis esti vera malŝlosilo al koroj kaj hejmoj de tiuj amindaj homoj, kun kiuj Esperantom-anka mi ne povus esti eĉ iomete interkonatiĝinta en vera senco de l' vorto.

Adiaŭante la grandetan anaron alvenintan por voĉe deziri al mi bonvojaĝon, mi sentis sinceran bedaŭron pro

deviga forlaso, kaj korinklinan estimon al miaj japanaj samcelanoj. - Feliĉe, ke mi povis respondi ne per fina "adiaŭ" sed per sopirata "ĝisrevido" al brava lando de l' suno leviganta.

—(f-ino) E. A. SINNOTTE.

KRONIKO.

Brisbano (Queensland-Kvislando).

Doktoro F. Williams trapasis nian urbon survoje al Samarai (Papuo, Nov-Gineo), kie li tenos la oficojn de delegito de UEA kaj distrikta kuracisto. Kelkaj ĉitieaj samideanoj (la prezidanto, sinjoroj Behncken, Hutton, Simon k. a.) havis la plezuron viziti la aĉablan kaj ageman kunbatalanton sur la ŝipo "Morinda" kaj diri "ĝisrevido" ĉe la forveturo.

La 30 aŭgusto multaj societanoj kaj iliaj amikoj kunvenis en la domo de sinjoro N. Mills, laŭ lia afabla invito, kaj tie havis gajan vesperon per muziko, ludoj kaj komedioj. Fraŭlinoj Gertrud Carrick kaj Littleton kaj sinjoro Littleton bone ludis amuzan komedieton de pensiona vivado... en angla; ĝi meritas tradukon kaj reludon en Esperanto. Sinjoroj Behncken, Mills kaj Hyde legis en Esperanto la komedion "Roza-lilio."

La 24 aŭgusto la nova fonografo akirita de la societo estis unuafoje ludata ĉe la kunveno, kiam oni prezentis kelkajn Esperantajn diskojn: "La Leterportisto," "Samideana Trinkanto," k. a. La societo mendis pluajn diskojn, kaj esperas, ke tiu ĉi metodo tre utilos al komencantoj.

En la sama vespero nia vigla kaj viveca samideano sinjoro Hutton alportis oficejan fonografon "Ediphone"; kaj la aparato elparolis al ni saluton de la sinjoro; poste, diversaj anoj faris proprajn "fonogramojn" kaj tuj reaŭdis la proprajn voĉojn... kaj pri ili ŝajnis ne tute kontentaj!

Wellington, N.Z.—La tria ĉiujara kunveno de la loka klubo okazis la 26an de aŭgusto. S-ro E. Jack prezidis antaŭ granda nombro da geanoj.

La jara raporto kaj bilanco adoptitaj atestis, ke la klubo estas en tre kontentiga pozicio. Kvindekunu personoj membre enskribiĝis dum la jaro.

Elektio de kluboficistoj por la nova jaro rezultis en tio, ke la antaŭa ag-komitato tutunuvoĉe re-enoficiĝis, nome, prezidanto, s-ro E. Jack; vic-prez., f-ino C. Smythson; kasisto, s-ro L. Dust; honora sek., s-ro B. Potts. Sekvante akcepton de speciala rezolucio, la ag-komitato plifortigis sin per elekto de

du pliaj anoj—s-inoj C. Leck kaj B. Potts.

Fine de la negoca kunveno, s-ro W. Edmanson, honora dumviva prez. de la klubo, deklamis en Esp-o The Seven Ages of Man (Shakespeare), kaj s-ro Jack rakontis amuzan anekdoton La Blinda Viro. Ambaŭ programeroj multe plaĉis.

Perth, W.A.—Sabaton, 13an Septembro, okazis la ekzamenoj por la unua kaj diploma atesto de la B.E.A.

Pro la afabla permeso de Profesoro Whitfield, la Vic-Kanceliero, ni uzis du ĉambrojn ĉe la Universitato. Tiukaze kvar anoj faris la unuan kaj du, la diploman. Post laboro ĉiuj kuntemanĝis kune, kaj bone ĝuis la okazon.

Melbourne, Vic.—Sub la aŭspicioj de la Melb. Esp. Klubo, tre ĝuebla danc-festo okazis je la unua de Septembro, kaj allogis la dancantojn inter la Esperantistaro.

Dum la unua semajno en Sept. okazis en la urbdomo amatora radio ekspozicio. Nia energia samideano, s-ro P. Holmes ricevis permeson fari malgrandan paroladon pri Esperanto ĉe la urbdomo, de kie amatora stacio elsendis programojn dum la semajno. La diskonadon de propagandaj folietoj ankaŭ entreprenis s-ro Holmes.

En Aŭgusto, ĉe la kunveno de la M.E.Soc., f-inoj Irwin kaj Cox kaj s-ro Holmes legis tri-aktan komedion, kiu estis tre ŝatata de la anoj.

Je la 16a de Sept., s-ro Hudson finis la rakonton de sia vojaĝo, al kiu, dum kelkaj monatoj, la anoj plezure aŭskultis. De Ipoh en Perak li iris al Kuala Lumpur, kiu havas 90,000 loĝantoj. Li vidis la stanminejojn, kie li renkontis du Aŭstraliajn inĝenierojn, kiuj bonkore montris al li ĉion interesan. Li ankaŭ priskribis detale la manieron el-tiri la kauĉukon el la arboj. Reveninte en Singapore li vidis la akvujon, kaj hinan templon ĉe la zoologia ĝardeno kaj ankaŭ rimarkis, ke la policianoj, kiuj kontrolas la veturilaron ĉe la kruciĝoj de la vojoj portas sur la dorso karton kun la sola vorto "Haltu," kaj sur la brusto similan karton kun la vorto "Iru." Li sin turnas al la veturiloj se li volas, ke ili ekiru. La sinjoro poste vizitis Baku Jahore, la ĉefurbo en Jahore, kie li vidis grandajn ananasplantejojn. En la ŝipo "Nieuw Zeeland" li lasis Singapore kaj atingis Batavia kie la ŝipo restis kelkajn horojn. Li vizitis Samarang kaj iris aŭtomobile al Sourabaya. Lasinte Batavia-on la ŝipo vojaĝis ĝis Macassar en la Celebes Insulo.

Vidinda akvofalo troviĝas kvardek mejlojn de la marbordo, kaj la ŝipo estis restonta nur du horojn ĉe la insulo, tamen, per aŭtomobilo la vojaĝantoj vidis la akvofalon kaj trafis la ŝipon! La ŝipo preterpasis Jaŭdan Insulon kaj poste atingis Brisbanon.—Pli suden ĝis Sidnejo, kaj poste li revenis Melbourne post kvinmonata foresto.

Sidnejo, N.S.K.—La 2an de sep-o, la jara balo de la Ligo de Nacioj brilis ĉe la Palais Royal; ĉeestis 1250 personoj el ĉiuj nacioj. En verdstela Esp. kostumo partoprenis dek geespistoj, el kiuj du — s-ro E. Pryke kaj f-ino J. Orr—reprezentis Esperantujon en la spektaklo de l' nacioj, kiu promenis ĉirkaŭ la balĉambro. Tiun ĉi jaron oni prezentis novaĵon en la spektaklo—grupojn, kiuj montris la diversajn aferojn en la mondo jam internaciaj, ekz. La Muziko, Literaturo, Scienco, Industrio. La guberniestro prezidis la balon.

Mondvagistoj vizitas!

La 11an de sep-o vizitis la klubon s-roj Kotulsky kaj Masluk el Latvio, ambaŭ Esp-istoj, kiuj motorbiciklete ĉirkaŭvojaĝas la mondon. Ili trafis en Esp-klubo en ĉiu granda urbo, de ili trapasita dum lastaj deksep monatoj, de kiam ili forlasis la hejmlandon. Kelkaj el la landoj de ili travagitaj estas Arabio, Persujo, Hindujo, Nederland-Hindujo.

La S.E.K. monata dancvespero okazis ĉe klubejo la 25an de sep-o, kiam ĉiu travivis plezurriĉan vesperon.

KURSO PER TRADUKADO.

(kondukata de s-ro G. Gordon, F.B.E.A. sekretariino, f-ino B. Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, Melbourne, E.10.)

TRADUKO II.

Multaj paĝoj de la libro temas pri la ceremonioj kaj korobroj (tiu ĉi lasta vorto estas transliterajo de la indiĝena vorto "korobra"—nomo de la ritaj, festaj kaj antaŭ- kaj postmilitaj dancadoj de la indiĝenoj). Pri ili estas preskribitaj (1) ritaro kaj procedo. Iuj korobroj daŭras kelke da (2) tagoj, kaj la Engŭura, la plej solena el la Aruntaj ceremonioj, daŭras kvar monatojn. Mirinda (3) estas la memoro de la indiĝenoj pri la mil detaloj de la ceremonioj kaj pri la faroj kaj vagadoj de iliaj prapatroj. La scion pri tio ili parole pasigas de unu generacio al la sekvanta, kaj ĝi atestas pri tiel tenema memoro, ke simila memoro ĉe blankulo estus laŭdata. Iuj el la ceremonioj

estas graciaj, aliaj estas groteskaj, tamen ĉiuj estas interesaj. Notinda estas tio, ke ĉe la ceremonioj en kazo de vizito de unu tribo al alia, la vizitantoj marŝas ĉirkaŭ la kamploĝejon alten levante la genuojn laŭ la maniero de la Prusa "anserpaŝado."

Lastatempe iuj bonintencaj personoj proponis la izoladon de la indigenoj en unu granda regiono rezervota por ili. Sir Baldwin Spencer diras, ke tio estus kruela, ĉar kvankam la vivo de indigenoj estas ĉiamdaŭra baraktado kontraŭ malfavoraj kondiĉoj, tamen li tute ne deziras forlasi la landon loĝitan de siaj prapatroj. Ĉiu natura trajto estas kunligita en lia menso kun iuj prapatroj, kiu ne nur vagadis tra la lando sed ankaŭ efektive kreis la ekzistajn sablajn altaĵojn, rokojn kaj arbojn, kaj for de tio li estus mizera.

La libro de Sir Baldwin Spencer estas la plej plena traktado ĝis nun publikigita pri raso rapide formortanta. (fino)

NIGRA JAŬDO.

La sesan de Februaro en la jaro dekokcent-kvindek-unua kuregis de unu ekstremo de la ŝtato al la alia pli terura brulego ol iam antaŭe aŭ poste okazis en Viktorio.

Rolf Boldrewood (elp.: bolderrūd), tre konata pro sia romano "Robbery under Arms" (t.e. Rabado kun Armiloj) kaj aliaj fikciverkoj (4), kiu en tiu tempo loĝis en Western District (elp.: ŝestern distrikt) postlasis al ni tre vivan priskribon de tiu memorinda tago. Li diras:—En la daŭro de kelke da (2) antaŭaj semajnoj la somera vetero estis varmega kaj seka. Mirinde estis, ke eĉ ĉe la marbordo mankis la ordinaraĵ tieaj pluvetoj. La fatala mateno estis nenormala, premaera, sen spireto de vento. La vaporplena ĉielo fariĝis flamstriita, malhela, minaca. Pluraj (4) teruritaĵ vidantoj pensis, ne senkaŭze, ke venis la lasta tago de la mondo. La tuta kolonio (6) Viktorio samtempe brulis. Brulis kulturbienoj kaj brutpaŝtejoj ĉe Portland kaj Port Fairy (elp.: feĵri). Ĉe la rivereto Upper Plenty oriente de Melbourne ĉirkaŭ tricent mejlojn (7) mortbruliĝis la edzino kaj infanoj de safisto. Malproksime sur la maro pasaĝeroj mire kaj time rigardis densan nigran nubon, pendantan super la linio de la marbordo kaj similantan al la kvazaŭa ĉerktuko, kiu probable (4) superpendis la entombigatan urbon Pompei, kiam la vulkano elĵetis sian vomadon de flamanta lafo. Malproksime cindroj dense falis sur la ferdekon de proksimiĝantaj

ŝipoj.

Pri unu el la brutpaŝtejoj en Western District li diras:—Post kvarono de horo estis flamantaj ĉiuj bariloj kaj konstruaĵoj de la bone ekipita biendomaro. Tiel forta estis la varmego, ke forkurinte (8) el la domo la domanoj trovis neeble reeniri ĝin. El ĝia enhavo oni povis savi nenion krom skribtablo kaj pentraĵo. La domanoj rigardante (8) ĉirkaŭen vidis sovaĝajn birdojn mortfalintaj (9) de sur la arboj, kangurojn pretersaltantaj (9) kun brulolekitaj aŭ brulantaj haŭtharoj, dum bovoj blekegante (8) pro timo kaj konsterno galepegis al la bordo de la rivero.

—(daŭrigota)

NOTARO II.

1. "preskribi," to prescribe. Kp.: 2 Kron. viii, 14.—2. Zam diras, ke estas diferenco inter "multaj" kaj "multe da." "Multaj homoj" signifas "diversaj homoj" (ciu aparte); "multe da homoj" signifas "granda nombro da homoj (kune)." Estas tiel sama diferenco inter "kelkaj" kaj "kelke da." Ankaŭ notu, ke "multe da jaroj" (aŭ horoj, ktp.) signifas, ke la jaroj (aŭ horoj, ktp.) estas kunaj (t.e. sinsekvaj), sed "multaj jaroj (aŭ horoj, ktp.) ne estas nepre sinsekvaj. Bedaŭrinde tre ofte iuj verkistoj ne observas la diferencon. Anstataŭ "multe da" oni povus egale bone skribi "multo da." Ekz. 32.—3. Rimarku la vortordon, kiu ebligas, ke adjektivo "mirinda" estu proksima al la substantivo "memoro" kaj ne kiel en la tradukata teksto.—4. Vortoj aprobitaj de Lingva Komitato: "fikcio," fiction; "pluraj," more than one; "probable," probably.—6. Ne metu "de" inter "kolonio" kaj "Viktorio."—7. Akuzativo, ĉar "ĉirkaŭ" ĉi tie ne estas prepozicio sed parto de la nedefinita nombro "ĉirkaŭ (aŭ "proksimume") 300".—8. Adverba participo. Cox 211.—9. Predikata participo. Cox 209b. Oni subkomprenas "esti" antaŭ la vorto. Oni povus egale bone skribi "mortfali," "pretersalti."

ESPERANTO ON THE MARCH.

Since last issue we have learned—

That at present the sale of "International Language" is about 4,600 copies monthly.

That "l'Eclairer de Nice," widely read on the Riviera, has a regular column of Esperanto in its Sunday evening edition.

That they have sold over 1000 Kompletta Gramatiko (Fruictier's book revised by Grenkamp-Kornfeld) at 5/- a copy.

That Capt. Eckner, the famous con-

ductor of the Graf Zeppelin, regards Esperanto as a "highly cultural instrument, a valuable time saver, and a potent aid to international amity."

AL TORENTO.

La unua sveda originalo.

Kun miksitaj sentoj oni forlegas lastajn liniojn de ĉi tiu romaneto. Plaĉas al ni la flulegbla simpleco de la lingvaĵo, samtempe kre-talenta, sed ni bedaŭras la mankon de sufiĉe grava temo. Lia belstilo meritas vesti pli impone ellaboritan verkon.

Ĝi estas ĉapitro el vivo de arbara junulo malsatanta la vivoplenan urbon Torento; li rekontas enparke knabinon; ŝi, jam perfidita de aliulo, korinklinas al la junulo volanta tion; sed nur poste ŝi konfesas al li sian naskontecon. La junulo animdolore foriras, por militservi, fine revenas, por amprotekti la patrino kaj infaneton.

Vidinte la majstran lertecon de la aŭtoro, oni bedaŭras, ke li ne donis la plenlibron de iu homa vivdramo. Tre esperinde estas, ke la tempopaso montras, ke Stellan Engholm posedas ankaŭ kapablon, interese rakonti en multĉapitre riĉenhavan romanon la sortojn de kelknombra personaro. Lia moderne-psikologia traktmaniero kunigita kun la riĉe provizita plumo de iu Bulthuis devus rezultigi por la Esperantistaro veran ĉefverkon.

Lingvaĵo estas preskaŭ senmakula. Sed 8, "sovaĝa marŝo" (?); 41, "benindaj" (pridankindaj?); 64, "suspiro, tristaj"; 70, "Li vidis ŝin iranta(n)...okupita(n)"; 73, "ekzistas unu po dekmilo" (...po unu en ĉiu dekmilo); 7/15 "partoj" (partioj?); 13, "onies." Se tio estas bona, ĉu ne ankaŭ "ĝies, ŝies, lies" k.c.? 28, "emis" (deziris); 32, "heziteme"; kial nenecese uzi -em? 40. Verax envortarigis "transmisiiloj." 52/1, 60, 88, "konfid" (fid). "Tutopo" (agregate).

Prezo 18p. ĉe Heroldo de Esp., Koln.

—Robo.

MOVIE MONARCH INTERVIEWED.

Carl Laemmle and Esperanto.

Mr. Joseph Scherer, delegate of the Universal Esperanto Association in Los Angeles, recently interviewed, on the subject of the talking films and Esperanto, the head of Universal Films, Mr. Carl Laemmle, who was director of "All Quiet on the Western Front." Mr. Laemmle readily answered all questions put to him by our fervent propagandist, who sent a full report, together with a splendid photograph

of himself and the "Napoleon of the Film Industry," to the Geneva organ, "Esperanto."

—Mr. Laemmle, do you believe in the utility of Esperanto for the talking-film?

—Certainly! I expressed an opinion to that effect four years ago, and today I am even more convinced of it.

—Is not the making of films in different languages very costly?

—Very! Because the English-speaking films are not liked in Europe owing to the language difficulty, several talkies are being re-"shot" in Spanish, German, and French, but I am very much afraid that their high cost will make their success, from a financial point of view, doubtful.

—Mr. Laemmle, do you know that Esperanto can be learned in a very short time?

—Certainly I do! Show me that gazette, you will see how much I understand of the language.

Good, Mr. Laemmle, here's "Esperanto," the official organ of the U.E.A., and here's our big-page weekly, "Heroldo de Esperanto."

Mr. Laemmle read from the papers: Renesanco—En la mondo venis nova sento—grandaj progresoj en Svedujo, and so on. Yes, he understood, and pronounced the words splendidly. It was a rare pleasure to Mr. Scherer to hear the world-famous producer wax eloquent over the idealistic element in the Esperanto movement, and over the simple structure of the language. I am certain," went on Mr. Laemmle, "that Esperanto is the best artificial language, and"—here he revealed the idealistic in his own character by his softened voice and sparkling eyes—"I don't doubt that it will be the most effective instrument of world-peace, and that Esperanto talking-films will be one of the means to that noble end."

—Do you know that Esperanto "talkies" already exist?

—Yes, I read with great interest that Paramount has made an Esperanto talking-film and shall study the result with even greater interest, because much will depend on that film.

By these words Carl Laemmle implied that other film companies, besides his own, would undertake this branch of production.

He showed to the world his sympathy with, and interest in, the Esperanto movement by having the interview photographed, and promising copies to every newspaper that reports it.

LAFCADIO HEARN.

Lafcadio Hearn havis strangan personecon. Filo de irlanda patro kaj greka patrino, li naskiĝis en 1850 sur la insulo Leucadia, en la Mediteranea Maro. Tiu gepatreco povus supozigi, ke en la ido aperos karakteraj apartaĵoj iom tre frapaj. Sed la knabo estis malĉielĉe gepatrita, ĉar en lia sepa aĝjaro la patrino forkuris kun amajisto, kaj la patro reedziĝis.

En Kimrujo vizitadis lernejon. Li perdis vidpovon de unu okulo, kio ankoraŭ pli malbeligis Jin, jam sen tio ne tre bonaspektan, ĉar li estis malaltstatura kaj korpe ne fortika. Post siaj lernjaroj li envagis Londonon, kie li devis en malriĉeco barakti, gajnante nur mizeran porvivon. Irinte Usonon, li laboris en Nov-Jorko kelktempe por stratvendisto de speguloj. Tiam li sensperte entreprenis raporti por ĵurnaloj, sed antaŭ ol fariĝi tridekjara, li gajnis por si kreskantan famon kiel verkisto.

Hearn estis malbonhumorema, facile incitata de ĉia kontraŭstaro, kaj amare sentis sian korpan malforton. Li povis nenium amikon altiri al si, tial, ke eĉ la plej malgranda nekonsentaĵo lin flamiĝis ĝis kolero kaj maldolĉa humoro.

Li studis la literaturon avide kaj senlace. La francan lingvon li memlernis. Tri jarojn li vivis sur Martinique, kie li skribis kelke el siaj plibonaj libroj. La influo de Pierre Loti troviĝas en lia verkaro. "Zouma" prezentas studon de la vivo en Martinique antaŭ 1840, en kiu jaro ribelis la negroj.

Reveninte Nov-Jorkon en 1889, Hearn profundigis en mizeron, ĉar lia naturo tute ne povis elteni la streĉon de la konkurado en modernaj urbejoj. Legante en lia bele simpalingva "Interpretoj de la Literaturo," verko bazita sur lia anglalingva lekcioaro al japanaj studentoj, oni povas ekkoni ie kaj ie lian akran suferadon pro la kondiĉoj de la nuntempa vivo.

Kun celo lin savi el malsatmortiĝo oni aranĝis lin sendi al Japanujo, por ke li verku libron. Li do iris al tiu lando, kie li trovis amikojn kaj vivon

de li ŝatatan. Li fariĝis instruisto kaj japana lernejo, adoptis Japanujon kiel propran landon, edzigis kun japanino, kaj finfine fariĝis pli orienteca ol la japanoj mem, tamen li ne plene posedis ilian lingvon.

Lia facile flamema naturo kondukis lin dum tuta lia vivo en multajn malfacilaĵojn, sed ŝajnas, ke en Japanujo li atingis sian ĝiseblan limon de feliĉo, kaj en la socia vivo, arto kaj literaturo de lapopolo, li trovis ĝuatan studmaterialon. Kiam profesoro de angla lingvo ĉe Tokio li komencis serion de lekcioj destinitaj lin famigi, kaj el tio kreskis verko kompilita el notlibroj de liaj aŭskultintoj.

Kun vera ĝuo oni legas la verkon, kiu plejparte ricevas sian ĉarmon pro la nepra neceso klarlingve interpreti la okcidentan pensadon kaj literaturon antaŭ liaj studentoj. La ĉarmo kaj simpleco de la lekcioj unikigas ilin kiel klarigojn pri la literaturo okcidenta. Kolektante materialon por siaj alparoloj, li esploris vastajn legkampojn, kaj la rezultaj studaĵoj estas pike freŝaj kaj originalaj, frukto de izolula studado en stranga lando de homo neinfluita de la samtempa pensado.

Lafcadio Hearn amis Japanujon per tuta animo, sed estis destinita restadi soleca homo, neniam ĝuste taksata dum sia vivo. En 1903 oni lin eksigis el la universitato, sed li feliĉe trovis peramike okupi alian katedron. Lia karierkaj vivfino tamen devis baldaŭ sekvi tiun enoficiĝon. En 1904, skribinte longan, vervan leteron al japana ŝipkapitano, li surpaŝis la verandon de sia dometo. Subite li terenfalas, kvazaŭ estingiĝis en li la vivoflamo. Tiel li mortis.

Li estis belpura animo, havanta fervoron por la belo en la literaturo, el kies interpretistoj li estis unu el la plej bonaj. (El la angla trad. Robo.)

AŬSTRALIA LITERATURO.

Proponata katedro por tio.

Profesoro G. Copling, okupanta la katedron de la angla lingvo en la universitato de Melbourne, dubas pri tio,

PERCY HOLMES

ELEKTRISTO KAJ RADIISTO.

212 NOONE-STR., CLIFTON HILL.

Prezentas al vi novan radi-aparaton. La "VERDASTELO" maŝino estas speciale konstruita por la Esperantistaro, kaj estas havebla laŭ diversaj ampleksoj, kiuj entenas de du ĝis ses valvoj. Aŭskultu ĝin en propra hejmo via!

MEMORU—POR ĈIO ELEKTRA.

Telefonu: JW 4017.

La nuno estas ĝusta tempo en kiu starigi katedron de aŭstralia literaturo. Devus esti destinita al tiu celo 25,000 funtoj sterlingaj, kio, pro la nebona stato de la landkaso, tre ŝajnas afero neplenumbla. Plue, kiom da studinda naciverkaro ni efektive havas? Kie, ekzemple, troviĝas ia aŭstralia dramoriginalo? Ĉu vere ni produktis sume pli ol seson de romanoj, kiuj povus pretendi klasikan rangon? Tre dubinde estas, ke studentoj donus tempon ol objekto, kiu, pro materiala mizero, devus esti tre limita? Laŭ lia scio, katedroj de la amerika literaturo ne ekzistas en Usono. Oni tie studas la anglan literaturon, komence la verkojn de Chaucer, Milton kaj Shakespeare kaj aliaj klasikuloj, poste tiaj verkistoj, kiaj Longfellow kaj Washington Irving, laŭ ĝusta vicigo. La profesoro opinias tion la plej sekvinda maniero. Aŭstralio devas atendi siajn Shelley-ojn kaj Dante-ojn. Niaj estontaj verko-kreuloj siatempe trovos rajtigitan lokon en la studplano de la angla literaturo, kaj la universitato tre volonte donos al tiuj eniron en la kursprogramo.

PRILINGVAJ DEMANDOJ.

Gim. in T. Zamenhof kaj Baghy preferas "sovjeto". Pĝ 60 Rabeno de Baharah. "Ĥinuĵo" estas la formo donita de la L. Komitato.

R.C. in Rand. Laŭ la S.A.T. tut-esperanto vortaro "respektiva" signifas "aparte rilatanta al nur unu el la pritraktataj objektoj."

Roto in B. Ni ne konsentas kun s-ro H. Boucon (pĝ 10 Heroldo de Esp.) pri "oferi," kaj ankaŭ pensas, ke la signifo de -em donita en la Univ. Vortaro estas klara. "Oferti" laŭ la fundamento ne havas la signifojn diritajn de s-ro B. En U.V. la Franca estas "sacrifier," kaj la Germana "opfern" kaj tiuj vortoj havas la Biblian sencon de "to sacrifice."

M. in Y. La S.A.T. tut-esperanta vortaro ne donas tiun signifon de "eksprese," sed Wuster ja havas "speciale, eksplicite" (la germanaj difin-vortoj estas tradukitaj proksimume en Esp., ĉar la vortaro estas Esperanto-

germana). La Oficiala Klasika Libro, eld. de la Lingva Komitato, kaj enhavanta ĉiun oficialan radikon, speciale avertas anglalingvanojn kontraŭ erara uzo de "eksprese" per traduki "expressly." Nia opinio, tiuj tredetalaj vortaroj, kiuj principe notas ĉian uzmanieron, eĉ la tut-eraraĵn, devus nepre meti nigraŝtonon apud la malimitindaĵon, por ke la erara uzo ne fariĝu ĝenerala.

"Ti-kiuj." La germana Esp. gramatiko de Christaller (1921) uzas la formon anstataŭ "tiuj, kiuj." Multe da rusoj kaj certaj eksterrusujaj Esp. anaroj favoras la novaĵon kaj ties plietendan aplikon, ekz., "ti-kiom," "ti-kie," ktp. Laŭ nia opinio tiaj estas danĝera rompo de la Fundamento, kaj tute ne imitindaj. Radikpartoj de fundamentaj vortoj estas sankte konservendaj.

M. in T. La uzo de komoj laŭ la Zamenhofa metodo multe helpas al simpla konstruo kaj senpena legado. Bedaŭre, tre ofte la verkistoj ignoras la majstran modelon tiurilate.

N. in Tom. Jes, tre konsilinde, ke ĉiu, kiu citas biblian frazon, ĉerpu ĝin rekte el la Esperanta Biblio eldonita de la B.F.B.S.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ni esprimas koran dankon pro ricevitaĵoj anoj kaj donacoj. Per fidela dediĉo de aparta monsumeto en ĉiu jaro, kaj akurata sendado de tio en nian kason, la ĉi-landaj Esperantistoj diskonigas tutmonden konstantan raporton pri loka batalado kaj antaŭeniro; krom tio, sentas pens-fratan ligecon kelkcentoj da vaste dissemitaj samideuloj, kies nura Esperanta legmaterialo estas tre ĝenerale La Suda Kruco.

F-ino P. McCabe, 4/6, junio, '31; s-ro Martinek, 4/6, junio, '31; s-ino F. Trewin, 4/6, sept., '31; per s-ino Sainsbury, 2/-; f-ino P. Abbott, 5/-, julio, '31; s-ro F. Halliday, 9/-, julio, '31; s-ro E. Jack, 5/-, junio, '31; s-ro J. Zidich, 5/-, sep., '31; kaj donaco 2/-; s-ro H. Byatt, 20/- donaco; Sydney Esp. Club, anonco, 5/6. (Entute:—£3/8/-).

HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiginto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

Specialisto pri Fontanplumoj

noveco. Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj

Notu adreson:—

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

"ESPERANTO-KIBOSHA."

El Japanujo venas rimarkinda raporto, preskaŭ nekredibla, ke nova E. revuo "Esperanto-Kiboŝa" jam havas 4697 abonantojn post nur trimonata varbo, kaj ke ĝiaj eldonantoj antaŭkalkulas 30000 jam ĉe la jarfino.

La Kiboŝa estas unu japana sociobonfara movado, la Societo Espera, penante disvastigi kleron kaj kulturon. Ĝi havas pli ol miliono de membroj, por kiuj oni ĵus eldonis la supretitolitan E. revuon, parte japanlingvan, lernigan kaj propagandan. Belpresita, artpapere, malkara por japanoj legaĵo, nur du ŝil. jare. Eldonejo Kiboŝa, 458 Nisiookubo, Tokio.

WHAT'S IN A NAME?

The citizens of Bialystok think there's a lot in one. It was in this small town near Warsaw that Babel's conqueror was born. After a lengthy agitation, the Polish Esperantists, aided by no small body of the local press, succeeded in presenting to the town council a petition signed by no fewer than 23,522 adults in Bialystok, praying that the street not known as Dzikan should be renamed Zamenhof. Even should this petition be set aside by a narrow-visioned clique of human anachronisms it would for ever remain a rich tribute of popular admiration for Poland's big-souled son.—(Pola Esp-isto).

QUERY CORNER.

Bat. in M. Generally, the East-European Esp-ists incline to simplicity in the matter of affixes. Digno, justo, pio, belo, farto, instead of digneco, justeco, pieco, beleco, faritaĵo, and that is quite regular if the sense is clear.

Donna. "I went to the theatre for a change." "Mi vizitis teatron (nur) por min distri"; or "Post sufiĉe longa nevizitado mi eniris teatron." Depends on the exact meaning you wish to convey. The dictionaries of Fulcher and Long, and of Rhodes have no definition of the word "change" used in this sense. Rhodes has "change of air, etc."—ŝanĝo de ĉirkaŭaĵoj."

L. in G. "Eventually" is often misused in English with the sense of "finally," "at last," but its right meaning is "in the event," "in the final result or issue," and that is the meaning of Esp. "eventuale." Eventuala,— "Povanta okazi, depende de necertaj cirkonstancoj"; la eventualaj profitoj de la afero "Eventuale" may mean also "if necessary"; "skribu, eventuale telegrafu."

Ĝisostulo en H. Even prof. Cart. conservative as he is, writes "en la ĉi postalista" (in the list that hereunder follows).

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, S-ino Sainsbury. "Noeline," Carrington St., Maylands, W.A.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro Johns; Sekretariino, S-ino L. Payne. 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu mardo je la 7.30a horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝejo Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbano Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str., proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde. FBEA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behnken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick. Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinslando (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President. Mr. E. C. Jack; Vice-President. Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.